# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

**N-ro 30** **Novembro** **1928**

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE

**TEKSTO:** Konvencioj. — La protekto de indiĝenaj laboristoj. — Labordisputoj en 1927. Mara laboro. — Laborakcidentoj. — Progreso pri konfirmo de konvencioj. Paĝo pri kooperado. —

## KONVENCIOJ

### Kubo konfirmas dekunu konvenciojn.

La 6^an^ de Aŭgusto 1928, la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj registris la konfirmon, en la nomo de la Registaro de Kubo, de dek unu internaciaj laboraj konvencioj, tio estas; la Konvencioj pri la laboro de virinoj antaŭ kaj post akuŝo, pri la nokta laboro de virinoj, pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al industria laboro, kaj pri la nokta laboro de junuloj en industrio, akceptitaj en la Unua Kunsido de la Konferenco (Washington, 1919) ; la Konvencioj pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al laboro sur maro, pri kompenso pro senlaboreco okaze de ŝipopereo kaj pri dungigo de maristoj, akceptitaj en la Dua Kunsido (Genova, 1920) kaj la Konvencioj pri kompenso pro labor-akcidentoj, pri kompenso pro profesiaj malsanoj, pri egaleco de traktado de naciaj kaj fremdaj laboristoj rilate al kompenso pro laborakcidentoj kaj pri nokta laboro en bakejoj akceptitaj en la Sepa Kunsido (Genève, 1925).

### Konvencio konfirmita de Nederlando.

La konfirmo per Nederlando de la Konvencio pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al industria laboro, akceptita de la Internacia Labora Konferenco enĝia Unua Kunsido en Washington en 1919, estis registrita de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la 2^an^ de Julio 1928.

### Germanujo kaj la Konvencioj.

La 13^an^ de Julio 1928, la Germana Reichstag akceptis projekton de leĝo aprobanta konfirmon de la Konvencioj pri kompenso pro profesiaj malsanoj kaj pri egaleco de traktado de naciaj kaj fremdaj laboristoj pri kompenso pro laborakcidentoj, konvencioj akceptitaj en la Sepa Kunsido de la Internacia Labora Konferenco (1925).

### La protekto de indiĝenaj laboristoj.

La enmeto de la demando pri deviga laboro en la tagordon de la Konferenco kunvenonta en 1929, donis specialan intereson al ĉiuj informoj pri la protekto de indiĝenaj laboristoj. Progreso montriĝas pri tiu afero en diversaj teritorioj regataj laŭ Mandato de la Ligo de Nacioj kaj en aliaj regionoj.

En la teritorio Tanganjika, cirkuleroj estis eldonitaj ordonantaj la iompostioman anstataŭigon de laborpago per monpago por lokaj publikaj servoj kaj la malpliigon de rekvizicoj por laboro en la nomo de la Registaro.

La Raporto de la Departemento pri Minoj de la Ora Marbordo (Okcidenta Afriko) por 1926-1927 montras, ke neniuj « kontraktitaj laboristoj » (« indentured labour »), tio estas laboristoj dungitaj per kontraktoj devigantaj ilin servi dum pluraj jaroj, sistemo kiu ofte rezultigas kondiĉojn tre similajn al sklaveco) laboris en la minejoj post 1925 kaj ke la malpliigo de mortado daŭras.

Sociaj leĝoj, grandaparte inspiritaj de la Internaciaj Laboraj Konvencioj, fariĝas en Palestino, Cipro kaj Cejlono. Unu el la leĝoj faritaj en Palestino anstataŭigas la Turkan sistemon de deviga laboro en vojokonstrukto kaj similaj servoj per lokaj impostoj. La loĝantoj povas doni laboron anstataŭ pago.

La eldonaĵoj de la Internacia Laboroflco enhavas interesajn raportojn pri indiĝena laboro en la Insuloj Gilbert kaj Ellis, Nova Gineo, Ugando, Rhodesio, Annam, Laos kaj Togo.

Gravaj rezolucioj pri tiu temo estis akceptitaj en la Kongreso de la Labora kaj Socialista Internacionalo en Bruselo (Aŭgusto 1928), kaj en la Internacia Misiista Konsilantaro en Jerusalem (Marto-Aprilo 1928). La rezolucio de la Konsilantaro konkludas jene :

La Konsilantaro esperas pligrandigon de la agado de la Ligo de Nacioj kaj de la Internacia Labora Organizaĵo tian, ke ĝi rezultigas kreadon de Internacia Kodo difinanta la reciprokajn rilatojn inter la diversaj potencoj interesataj pri kolonia ekspansio kaj la indiĝenaj loĝantaroj influataj de tiu ekspansio, kaj ankaŭ pli plenan kunlaboron inter ĉiuj nacioj; ĉu membroj de la Ligo ĉu ne, por la atingo de tiu celo. Ĝi konsideras la ekonomiajn funkciojn de la Ligo, pri aferoj kiel pruntoj, koncesioj, laboro, impostopolitiko kaj interkomunikiloj, kiel estantajn inter la plej gravaj fakoj de ĝia laboro, kaj deziras vidi ilin plivastiĝi kiel eble plej larĝe kaj rapide. Nur per la starigo de tia internacia aŭtoritato, kapabla por fari senpartian justecon al la postuloj de ĉiuj nacioj, povas esti evitataj konfliktoj inter nacioj okupataj pri ekonomika ekspansio.

La rezolucio de la Labora kaj Socialista Internacionalo ankaŭ deklaras ke la Internacia Laboroficejo devas prepari kodon por la protekto de indiĝenaj laboristoj, kiu devas esti akceptita, kiel minimuma protekto-kodo, de ĉiuj Ŝtatoj administrantaj kolonojn. Ĝi ankaŭ deklaras, ke la mandatosistemo de la Ligo de Nacioj devas esti plivastigita por ampleksi tutan tropikan Afrikon kaj simlajn koloniojn de primitiva kulturo alie.

Estas interesa fakto, ke la kritikoj de la reprezentanto de la Internacia Laboroficejo ĉe la Konstanta Komisiono pri Mandatoj de la Ligo de Nacioj rezultigis gravan modifon de la Regularo pri deviga terkulturo en Nova Gineo, territorio kies Mandatulo estas Aŭstralio. La efiko de tiuj modifoj estas, limigi devigan kulturon al la plantado, rikoltado kaj magazenado de kreskaĵoj por la persona uzo de la individua indiĝeno kaj lia familio.

## Labordisputoj en 1927.

### Granda-Britujo

La nombro da disputoj okazigantaj ĉeson de laboro en 1927 en Granda-Britujo kaj Norda Irlando estis 308. La tuta nombro da laboristoj pere aŭ senpere koncernataj en ĉiuj konfliktoj en 1927 estis ĉirkaŭ 114.200, kaj la tempo perdita ĉirkaŭ 1.174.000 labortagoj. La statistikoj por 1926 montris 323 disputojn, 2.751.300 laboristojn, kaj 162.233.000 labortagojn. Ĉi tiuj ciferoj enkalkulas 1.580.000 laboristojn trafitajn de la ĝenerala striko kaj 1.050.000 de la striko de karbministoj, strikoj perdigintaj respektive 15.000.000 kaj 145 200.000 labortagojn.

La industrioj ĉefe koncernataj en 1927 estis la vest-industrioj (9.200 laboristoj kun perdo de 190.000 labortagoj) kaj la konstruindustrioj (7.800 laboristoj kun perdo de 129.000 labortagoj).

Salajrodemandoj kaŭzis 53,6 por cento de la disputoj, trafantaj 34,4 per cento de la laboristoj koncernataj. Demandoj pri la dungo de difinitaj klasoj aŭ personoj kaŭzis 22,1 per cento de la disputoj, koncernantaj 32,5 por cento de la laboristoj, kaj demandoj pri laborhoroj estis la temoj de 7,1 por cento de la disputoj, trafantaj 14,6 por cento de la laboristoj.

La rezultatoj estis favoraj al la laboristoj en 19,8 por cento de la disputoj, koncernintaj 28,1 por cento de la laboristoj, kaj favoraj al la mastroj en 38,3 por cento de la disputoj koncernintaj 30,6 por cento de la laboristoj; 41,6 por cento de la disputoj koncernintaj 41,2 por cento de la laboristoj, finiĝis per kompromiso.

73,9 por cento de la disputoj, koncernitaj 77,4 por cento de la laboristoj estis finitaj per senperaj traktadoj inter la partioj; en 9,8 por cento de la disputoj, trafintaj 5,8 por cento de la laboristoj, laboro estis rekomencita laŭ la postuloj de la mastroj; en 6,2 por cento de la kazoj (0,4 por cento de la laboristoj), strikantoj estis anstataŭigitaj per aliaj laboristoj. 4,9 por cento de la disputoj, koncernintaj, kaj 1,3 por cento, trafintaj 5,5 por cento de la laboristoj, per arbitracio.

148 disputoj koncernis malpli ol 100 laboristojn, 136 trafis inter 100 kaj 1.000; 20, inter 1.000 kaj 5.000, kaj 4, inter 5.000 kaj 10.000.

159 disputoj daŭris malpli ol unu semajnon, 10 de 10 al 20 semajnoj, kaj 5 pli ol 20 semajnoj.

La nombro da labortagoj perditaj estis malpli ol 500 en 157 disputoj, de 500 al 5.000 en 123, de 5.000 al 100.000 en 27, kaj pli ol 100.000 en unu disputo.

### Aŭstrio.

Dum 1927, okazis en Aŭstrio 189 strikoj, koncernantaj 27.803 laboristojn. La ciferoj por 1926 estis 429 koncernantaj 18,624 laboristojn.

La nombro da labortagoj perditaj estis 475.857 (232.944 en 1926). 429 entreprenoj, okupantaj 36.268 laboristojn, estis trafitaj (en 1926, 653 entreprenoj, okupantaj 24.711 laboristojn).

Dum la sama periodo okazis 21 mastro-strikoj (lockouts) koncernantaj 87 entreprenojn, okupantajn 7.343 laboristojn. El tiuj, 6.531 estis senlaboraj por 209.851 tagoj entute. La ciferoj por 1926 estis 18 mastrostrikoj, koncernantaj 84 entreprenojn, okupantajn 4.530 laboristojn, el kiuj 3.319 perdis entute 64.740 labotagojn.

47 strikoj, koncernantaj 4.373 laboristojn, tute sukcesis; 117 koncernantaj 20.798 laboristojn, parte sukcesis; 25 koncernantaj 2.632 laboristojn, malsukcesis.

### Japanujo.

Dum 1927 okazis en Japanujo 1.012 labordisputoj, koncernantaj 80.489 laboristojn. (En 1926 okazis 1.159 disuptoj, koncernantaj 125.894 laboristojn.) El la disputoj en 1927, 383 estis strikoj aŭ mastrostrikoj, koncernantaj 46.672 laboristojn kaj perdigintaj 791.599 labortagojn.

---

## Mara Laboro.

Kiel oni jam scias, speciala kunsido de la Internacia Labora Konferenco por pritrakti marajn demandojn okazos en 1929. La tagordo enhavos la demandojn: pri reguligo de laborhoroj sur la maro, pri la protekto de maristoj okaze de malsano, inkluzive kuracado de vunditoj surŝipe, kaj pri la plibonigo de la vivkondiĉoj de maristoj dum ilia restado en havenurboj.

En la jara kongreso de la Internacia Asocio de Oficiroj de la Komerca Ŝiparo multe da tempo estis dediĉita al la diskuto de tiuj demandoj.

Pri la reguligo de laborhoroj la kongreso notis la enketojn faritajn en Nederlando de la asocioj de oficiroj kaj ŝipposedantoj kaj ankaŭ la enketon faritan iniciate de la Germanaj inĝenioroficiroj pri la organizo de laboro ĉe maŝinoj kaj en hejtejoj. Oni decidis, ke la Sekretararo daŭre kolektu la necesajn informojn, ke kelektiva kaj individua propagando por la limigo de laborhoroj estu intensigata, kaj ke la naciaj organizaĵoj, kunlaboru kun la teknikaj servoj de la Internacia Laboroficejo pri la kolekto de sciigoj.

Pri la protekto de la sano de maristoj la oficiroj de la komerca ŝiparo preparis minimuman programon, kiun ĝi konsideras tuj efektivigebla. Tiu mallonge dirite postulas personaron kaj ilaron en ĉiuj ŝipoj por flegi kaj kuraci malsanajn kan vunditajn maristojn.

Raporto estis ankaŭ prezentita pri la proponita revizio de la Konvencio de 1914 pri Sendanĝereco por vivo sur la maro. Oni decidis, ke la aliĝantaj organizaĵoj prezentu la konkludojn de la raporto al siaj Registaroj kaj insistu, ke konvenas atenti la opiniojn de la oficiroj en la preparoj por la kunvenonta Konferenco en Londono.

La Belga Federacio de Oficiroj de la Komerca Ŝiparo unuanime akceptis rezolucion petantan la Belgan Registaron ke ĝi komisiu al siaj delegitoj al la Mara Kunsido de la Internacia Labora Konferenco en 1929, apogi la justajn postulojn de la maristoj kaj voĉdoni por internacia konvencio limiganta la laborhorojn de maristoj laŭ la principoj de la Washingtona Konvencio.

La Belga Unuiĝo de Senfadenaj Telegrafistoj en la Komerca Ŝiparo, en sia ĝenerala kunveno en Antwerpeno, la 13an de Aŭgusto 1928, unuanime akceptis similan rezolucion.

## Laborakcidentoj.

La Internacia Laboroficejo, en sia Kroniko pri Industria Sendanĝereco, eldonas novajn statistikojn kiuj montras la gravecon de la perdoj kaŭzitaj de laborakcidentoj en diversaj landoj.

En Francujo, dum 1926, 989.442 akcidentoj estis sciigitaj el kiuj 2.392 estis mortigaj kaj 8.093 rezultigis daŭran invalidecon. Tio ne enkalkulas la akcidentojn okazintajn en fervojoj kaj minejoj.

En Belgujo, la nombro da akcidentoj sciigitaj en 1926 estis 80.523.

En Hungarujo, ĉe 577.433 laboristoj plene okupataj, la proporcio de akcidentoj en 1926 estis 34,7 por 1.000, el kiuj 0,32 estis mortigaj. En 1925, la proporcio estis 30,4 por 1.000.

### Internacia agado.

*Kooperado en la nuna kunsido de la Konsulta Ekonomia Komitato.*

Tri kooperanoj, Sno Emmi Freundlich, Sro. Anders Orne kaj Sro. Vanio Tanner, estis elektitaj, kiel membroj de la Konsulta Ekonomia Komitato de la Ligo de Nacioj. Sro. Henry May, Ĉenerala Sekretario de la Internacia Koopera Alianco, estis invitita de la Komitato por partopreni ĝiajn laborojn, kiel spertulo. El la komitatanoj reprezentantaj agrikulturon, pluraj estis pli malpli interesataj pri kooperado. Sro Tanner bedaŭrinde ne povis ĉeesti la kunvenojn.

La problemoj pri kooperado, kiel en la Tutmonda Ekonomia Konferenco, estis diskutitaj kune kun agrikulturaj problemoj. La rezolucioj akceptitaj tiurilate estas la jenaj:

La Konsulta Komitato proponas:

(a) ke la Ligo de Nacioj kolektigu la ekzistantan dokumentaron pri intensigo de agrikultura produktado, pri agrikultura instruado, pri kooperado kaj agrikultura kredito, pri transporto kaj disvendado de agrikulturaj produktaĵoj, por faciligi la studon de la plej taŭgaj metodoj por reskigi agrikulturon, kaj.

(b) ke la Ligo de Nacioj esploru la rimedojn por starigi senperajn rilatojn inter Produktaj kaj Konsumaj Kooperaj Societoj en la diversaj landoj, laŭ la rezolucio de la Ekonomia Konferenco.

### Grekujo.

*Agriultura Kredito.*

La jenaj informoj estas ĉerpitaj el raporto sendita al la Internacia Laboroficejo de la Fako pri Agrikultura Kredito en la Nacia Banko de Grekujo.

En 1861, la Banko asignis 2.000.000 draĥmojn por agrikulturaj kreditoj. En 1896, la sumo estis pliigita al 10.000.000.

En 1914, Konvencio inter la Registaro kaj la Banko ordonis, ke la Banko asignu 25.000.000 por agrikulturaj kreditoj prefere donotaj pere de agrikulturaj kooperativoj.

La jena tabelo montras, ke la kreditoj donitaj de la Banko daŭre pligrandiĝis kaj ke la proporcio donita al agrikuturaj kooperativoj fariĝis pli kaj pli granda.

Draĥmoj

| | 1915 | 1920 | 1925 |
|---|---|---|---|
| Agrikultural kooperativoj | 223.000 | 24.841.751 | 543.909.109 |
| Individuaj produktantoj | 4.462.160 | 54.720.630 | 398.550.650 |
| | 4.685.160 | 79.562.381 | 942.459.759 |
| Proporcio de kreditoj donitaj al agrikulturaj kooperativoj | 4,97 % | 31,22 % | 57,71 % |

| | 1926 | 1927 |
|---|---|---|
| Agrikultural kooperativoj | 468.250.147 | 809.195.792 |
| Individuaj produktantoj | 255.513.918 | 335.256.335 |
| | 723.764.065 | 1.144.542.127 |
| Proporcio de kreditoj donitaj al agrikulturaj kooperativoj | 64,69 % | 70,70 % |

Antaŭ la evoluado de kooperativoj, agrikultura kredito, eĉ kun la helpo de la Nacia Banko, funkciis tre malbone. Ĝi nur profitis malgrandan nombron da kulturistoj, precipe tiujn, kiuj malplej bezonis ĝin.

La situacio de la kamparanoj estis mizerega. La tero, kulturata per lignaj plugiloj kaj laŭ primitivaj metodoj, produktis malmulte kaj la kulturisto estis viktimo de procentego, pagante kelkafoj ĝis 100 por cento por pruntita kapitalo. La vilaĝa spicisto estis ĝenerale ankaŭ pruntedonisto kaj devigis la prenantojn liveri al li iliajn produktaĵojn por prezoj fiksitaj de li.

Post 1915, dum malmutaj jaroj, kaj malgraŭ la milito kaj aliaj malordoj, granda koopera movado evoluis kaj pere de tiu agrikultura kredito estis organizita.

La Nacia Banko multe kunhelpis pri tio. Ĝi ne nur pruntedonis monon; ĝi ankaŭ laboris por instrui la kamparanojn kaj stimuli la kooperativojn. Ĝi interesiĝis pri la aĉeto de « Caberra » semaĵo, speco precipe taŭga por la kulturo de tritiko en Grekujo.

La Nacia Banko ankaŭ helpis en la solvo de la problemo pri sekvinberoj kaj sukcesis fondigi la Aŭtonomia Oficejo por Sekvinberoj. Ĝi ankaŭ helpis la tabakokulturistojn organizi la vendon de ilia rikolto kaj tie plurfoje savis tiun gravan produktaĵon de la lando de la krizo, kiu minacis ĝin.

### Bulgario.

*Progreso de la koopera movado.*

Laŭ informoj donitaj de la Koopera Banko kaj la Agrikultura Banko, la koopera movado en Bulgario multe progresis dum la lastaj jaroj, iel la jena tabelo montres :

*Urbaj Kooperaj Societoj.*

| Jaro | Nombro da Societoj | Nombro da membroj |
|---|---|---|
| 1922 | 169 | 82.000 |
| 1923 | 244 | 122.000 |
| 1924 | 297 | 235.000 |
| 1925 | 310 | 249.000 |
| 1926 | 349 | 310.000 |
| 1927 | 389 | |

El la urbaj kooperativoj la popolaj bankoj estas plej grandnombraj kaj plej gravaj (71 en 1922 kaj 161 en 1927) ; poste venas la konsumkooperativoj (29 en 1922, kaj 73 en 1927) ; kaj fine la produktaj kaj laboraj kooperativoj (36 en 1922, kaj 73 en 1927). La kapitalo posedita de la urbaj societoj en 1922 valoris 120.000.000 levojn, kaj en 1926, 800.000.000 levojn. La pruntita kapitalo estis 114.000.000 levoj en 1922, kaj 860.000.000 en 1926.

*Kampaj Societoj.*

| Jaro | Nombro de Societoj | Individuaj membroj | Kolektivaj membroj | Ĉiuj membroj |
|---|---|---|---|---|
| 1925 | 1.260 | 177.855 | 1.552 | 179.407 |
| 1926 | 1.320 | 195.482 | 1.565 | 197.047 |
| 1927 | 1.399 | 197.385 | — | — |

La kapitalo posedita de la kampaj societoj estis 163.000.000 levoj en 1924, 416.000.000 en 1926 kaj 429.000.000 en 1927.

La tuta nombro da kooperativoj aliĝintaj al la du bankoj supprenominataj estis, je la fino de 1926, 1.669, kun 507.000 membroj kaj 1.216.000.000 levoj da posedita kapitalo.

PRESEJO A. GRANCHAMP, ANNEMASSE.